

Дмитрий Николаевич Садовников,  
Sten'ka Razin

*tradukita de Frieder Weigold*

1. De l' insulo, de la verda,  
Dum la tempo de la car',  
Naĝas vico da boatoj,  
La arme' de l' kozakar'.

2. Sur l'unua Sten'ka Razin.  
Oni gaja vidas lin.  
Feliĉega tiu tago!  
Li edziĝis kun princin'.

3. Ŝi mallevas la okulojn.  
Kvazaŭ inter viv' kaj mort'  
Ŝi aŭskultas en silento  
Al sincera, firma vort'.

4. Liaj viroj tamen grumblas:  
"Post nur unu nokto jam  
Faris ŝi lin mem virino.  
Li perfidas nin pro am'!"

5. Tion aŭdas kolerante  
La kozaka kapitan'.  
Kaj li kaptas la princinon,  
Per la forta, ega man'.

...

Дмитрий Николаевич Садовников,  
Stenka Rasin

*tradukita de N. N. 21*

In den Wellen hinter Inseln  
Ziehen Kähne malerisch, -  
|: Fangen leis an aufzuwachen,  
Bang ist jedes Angesicht. :|

Stenka Rasin vorn als erster,  
Selig in der Trunkenheit,  
|: Hält im Arme die Prinzessin,  
Die er eben erst befreit. :|

.....  
.....  
.....  
.....

.....  
.....  
.....  
.....

.....  
.....  
.....  
.....

...

6. Fulmas la okuloj duraj,  
Flame ŝtormas la koler'!  
Kaj eksonas lia voĉo  
Krudglacie kiel fer':

.....  
.....  
.....  
.....

7. "Ion ajn, eĉ mian kapon  
Ja fordonus mi por vi!  
La feliĉon mi ja trovis.  
Ĉio estas ŝi por mi!

Plötzlich tönt ein dumpf Gemurre:  
Er verrät uns um ein Weib,  
|: All der Seinen Glück vergißt er  
Um geringen Zeitvertreib. :|

8. Volga, Volga, kara panjo,  
Ho rivera rusa vi!  
Kiam vidis vi oferon,  
kian nun fordonas mi?

Wolga, Wolga, Mutter Wolga,  
Ruhig fließest du dahin,  
|: Ahnst nicht, was ein Donkosake  
Fürchterliches hat im Sinn. :|

9. Ke neniam ni kverelu  
Pro la persa belulin':  
Volga, Volga, kara panjo -  
La oferon - prenu ĝin!"

.....  
.....  
.....  
.....

10. Kaj per ambaŭ fortaj manoj,  
Dum ektimas la princin' -  
Ve, deborde ŝin li puŝas! -  
Kaj la ondoj voras ŝin!

Vorn als erster Stenka Rasin  
Hebt das Weib in wilder Wut, -  
|: Wolga, Wolga, nimm ein Opfer!  
Und er wirft sie in die Flut. :|

11. "Diabloj! Kial vi silentas?  
Dancu, kantu ja pro ŝi!  
Kaj eksonu la kantado,  
La fratara melodi'!"

Und er sieht sie untergehen,  
Hört noch ihren Jammerschrei:  
|: Stirb als Opfer meiner Treue!  
Stenka Rasin, er ist frei. :|

...

...

12. De l' insulo, de la verda,  
 Dum la tempo de la car',  
 Naĝas vico da boatoj,  
 La arme' de l' kozakar'.

Und die Kähne ziehen weiter,  
 Und die Kähne ziehen fort,  
 |: Und die Wolga fließet weiter  
 Über diesen Schreckensort.

*Traduko de la Rusa poeto “Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)” de ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, \*1847 – †1883) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Traduko de la Rusa poeto “Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)” de ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, \*1847 – †1883) en la Germanan de N. N. 21.*

*Arg-478-928 (2009-10-30 16:18:33)*

*Arg-478-1038 (2010-03-09 15:31:43)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2008-10-09 tiun ĉi Esperantigon de la konata rusa kanto de s-ano Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim), dum kunveno de la Munkena Esperanto-grupo.*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi germanigon de la kanto en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/stenkara.html>. Latinskriba aliskribo kaj laŭvorta germanigo troveblas en [http://www.kaikracht.de/balalaika/songs/izza\\_bal.htm](http://www.kaikracht.de/balalaika/songs/izza_bal.htm). Vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Stenka\\_Rasin](http://de.wikipedia.org/wiki/Stenka_Rasin).*